

# Kanto : Nova mondo

**Nova mondo**
**Mia espero je la vivo**
**neniam ĉesos.**

Nova mondo
Vi donacis al mi novan mondon,
en kiu nenio disigas nin.
Kune ni iras, ni atendas kio venos.
Mi ĉiam restos apud vi.
Vi venigis al mi la surteran ĉielon.
Kun vi brilas la ter' pli ol ĉiu stelo.
Ni faris multegajn planojn, la tuta vivo atendas nin.
Nia amo neniam ĉesos, ĝi plue restos.
Plenaj je amo kaj paco, ni konstruas la novan tempon.
Nenio kaj neniu forprenos de ni tiun amon
Nenio povas nin disigi. Tion mi kredis.
Sed vero ekis tute malsama.
Ili disigis nin. Ili diris al ni : Nur por nelonge.
Ke vi ne plu revenos, neniu tion diris al mi,
kaj ke tio eterne daŭros.
Kiu aŭdacis detrui nian feliĉon,
kaj pensi, ke la tuta tero estas via ?
Per malsatego kaj milito vi detruas la teron
Kkaj vi forprenas tion kio estas nia.
Vi alportas teroron kaj militon kiujn neniu volas
kaj suferon kaj morton sur tiun ĉi teron.
Estas homoj ja kiuj mortas
viroj kiuj foriras,
filoj kiuj neniam revenos.
Vi alportas teroron kaj militon kiujn neniu volas
kaj suferon kaj morton sur tiun ĉi teron.
Estas homoj ja kiuj mortas
viroj kiuj foriras,
filoj kiuj neniam revenos.
Mia espero je la vivo
neniam ĉesos.
Plena je paco kaj amo,
mi plu konstruas tiun ĉi novan tempon.
Nenio kaj neniu devas sperti
kion signifas disigo.
Ni konstruu pacon
en tiu ĉi nova tempo.
Mia amo al vi neniam ĉesos.
Plena je amo kaj paco
mi plu konstruas tiun ĉi novan tempon.

Nenio kaj neniu devas sperti
kion signifas disigo.
Ni konstruu pacon
en tiu ĉi nova tempo.
Ni konstruu pacon
en tiu ĉi nova tempo.

**de --**

## Fontoj:

http://www.anti-zensur.info

## Ankaŭ tio povus interesi vin:

---

**Kla.TV – Novaĵoj alternativaj ... liberaj – sendependaj – necenzuritaj ...**

- Tio kion la amaskomunikiloj devus ne kaŝi ...
- Tio pri kio oni aŭdas malmulte, de la popolo por la popolo...
- Regulaj informoj ĉe www.kla.tv/eo

Indas resti ĉe ni!

**Senpaga abono al nia retpoŝta informilo ĉi tie:** **www.kla.tv/abo-en**

**Sekureca Avizo:**

Kontraŭaj voĉoj bedaŭrinde estas pli kaj pli cenzuritaj kaj subpremitaj. Tiom longe kiom ni ne orientiĝas laŭ la interesoj kaj ideologioj de la gazetara sistemo, ni ĉiam sciu, ke troviĝos pretekstoj por bloki aŭ forigi Kla.TV.

**Do enretiĝu ekstere de interreto hodiaŭ! Klaku ĉi tie:** **www.kla.tv/vernetzung&lang=eo**

*Licenco:* *Licence Creative Commons kun atribuo*

Oni rajtas distribui kaj uzi nian materialon kun atribuo! Tamen la materialo ne povas esti uzata ekster kunteksto. Sed por institucioj financitaj per la aŭdvida imposto, ĉi tio estas permesita nur kun nia interkonsento. Malobservoj povas kaŭzi procesigon.